

Enhavo

- **anoncoj**

Forpaso: Marsha "Koto" FARMER; UK en 2017 okazos ne en Montrealo, sed en Seulo; Novaj varoj en la retbutiko; Media hits; Traduku usonan klasikajon por Liro-2015

- **leterkesto**

Feliĉe mi ne timis iri al Detrojto

- **Ĝojplena kongreso en Detrojto**

kongresaj raportoj - Raymond Brisebois

La etoso de la detrojta kongresejo kaj aliaj kunvenoj, inkluzive la bonegan universitatan dormejon, kondukis al ĝojplenaj eventoj en tiu histori-plena kaj signifa usona urbo bonvenema.

- **NASK: sidu, parolu, kaj ĝuu!**

loke - Mara Rockliff

Antaŭ ol ni alvenis al NASK, ni ne sciis, ĉu ni tiom ĝuus paroli. Fakte, ni eĉ ne certis, ĉu ni povus paroli Esperanton. Ni studis la lingvon dum nur ses monatoj, kaj ni studis hejme, rete. Ni neniam parolis la lingvon kun veraj vivaj homoj.

- **Ellie kaj la fantomo**

rakonte - Johano Bentley

Ĉu vi kredas je fantomoj? Laŭ mi, ili ne ekzistas. Aŭ tion mi antaŭe kredis, sed nun mi ne estas tute certa.

- **Duolingo: a turning point for Esperanto?**

instruado - Xavier Alcalde

Duolingo is one of the most popular online tools for learning languages, with more than 100 million users. If current trends continue, it will eventually be the most popular. And now, it can also be used for learning Esperanto.

- **Legenda**

senintenca esperantaĵo? - Ruth Keves-Cohen

Ĉu budapeŝtaj legendoj estas tiel banalaj, ke ĉefrolas en ili eĉ urbaj krosŝipetoj?

ISSN: 1056-0297

Usona Esperantisto
Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2015:3 (maj-jun)

American Esperantist
Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2015:3 (may-jun)



Ĉi-numere:

- *Rakonte:* Ellie kaj la fantomo
- *Instruado:* Duolingo
- raporto pri NASK
- Kaj multe pli...

Novajoj el la du-landa kongreso en Detrojto

Forpaso: Marsha “Koto” FARMER

En Majo forpasis Marsha “Koto” FARMER en Kalifornio. De ŝia edzo David “Vido” GILLETT venis la tristiga novaĵo:

Eble vi renkontis mian edzinon ĉe iuj TKEK-oj aŭ NASK-oj de 2007 ĝis 2013. Ŝi diplomiĝis kiel lingvisto ĉirkaŭ 1998, kaj komencistiĝis ĉe la universitato Stanford.

Ŝi iom malsaniĝis en 2011, kaj pli serioze en 2014–2015; ŝi ankaŭ blindiĝis.

Restas edzo, bo-frato, tri bo-fratinoj, tri nevinoj kaj kvar nepoj.

UK en 2017 okazos ne en Montrealo, sed en Seulo

La kandidatiĝo de Montrealo por la Universala Kongreso en 2017 malgajnis al Seulo. Laŭ la prezidanto de UEA, pli rolis movadaj argumentoj (ekzemple, situo de Seulo en Orienta Azio, proksime al kaj Japanujo kaj Ĉinujo) ol forteco de la dosiero.



Krome, alia faktoro eventuale estas tio, ke Seulo jam kandidatis kaj malgajnis (al Hanojo en 2012 – fakto kiun mi eksciis nur longe post kiam ni kandidatiĝis) antaŭe, do eble iuj estraranoj sentis ke jam venis la vico por Seulo (tio estas konjekto mia, tamen, ne oficiala informo).

Tamen, espero restas! Mi diskutas nun kun Kanada Esperanto-Asocio, Esperanto-Societo Kebekia, kaj Esperanto-USA, pri la eblo reproponi por 2019. Se ni tion faros (kaj mi esperas ke ni ja tion faros), la kandidateco de Montrealo ĝuos la avantaĝon de frua anonco kaj la entuziasmo, intereso kaj impeto jam generitaj de nia unua provo.

Mi dankas al ĉiuj pro la subteno de la kandidateco de Montrealo por UK-2017 – kaj mi forte esperas ke mi povos same kalkuli je via subteno por daŭrigo de

nia bela projekto, nur kun reviziita celdato!
— Joel AMIS, Komitato por UK en Montrealo

Novaj varoj en la retbutiko

- **STEFANO FUĜAS LA POLICO**

Claude PIRON. La unua krim-rakonto verkita de Piron. Novelo eldonita en Monato dum 1981. La unua apero de Jano, Ĝoja kaj Stefano. Elektronika dosiero, senpage elŝutebla por membroj.



- **ESPERANTO-LITERATURO (KD)**

Originalaĵojn kaj tradukaĵojn legas, recitas: W. AULD, D. CHARTERS, T. JUNG, K. KALOCSEY, N. RYTJKOV, B. RAGNARSSON, V. SADLER, M. SLOPER, kaj aliaj. KD. 69 minutoj. 2003. \$12.50; membroj ricevas 10% da rabato.

- **REJKJAVIKO 1977 (KD)**

Diversaj. Sondokumentoj el la 62-a UK, kun la voĉoj de H. TONKIN, R. HARRY, B. RAGNARSSON, A. M'BOW (la lasta en la franca). KD. 73 minutoj. 2003. Nederlando. \$12.50; membroj ricevas 10% da rabato.

- **NATURO KAJ SOCIO**

Edgar GUHDE. Enkonduko al ekologiaj penso kaj ago. “La esenca mesaĝo de ekologio estas limigo: ekzistas nura tiomo akceptebla de la biosfero kaj nura tiomo donebla de ĝi, kaj tio do povus esti malmulte ol ni deziras.” Mola bindaĵo. 169 pĝ. 1985. Germanujo. \$8.68.

- **EL LA POLVO DE LA TERO**

William Frederick ROLTE. Enkonduko al la scienco de grundo, en rilato al plantoj kaj agrikulturo. Enhavas glosaron. \$2.52.

- **KIAL KAJ KIEL MANGI VEGANE**

Lodĉjo. Argumentoj por veganismo kaj konsiloj por tiuj, kiuj interesiĝas pri ĝi. Mola bindaĵo. 35 pĝ. 2014. Slovakujo. \$3.13.

Media hits

- On April 21st, Florida member Maria Murphy was interviewed by columnist Stephen Baumann for his *Life Stories* column in the *Englewood Sun and Weekly Herald*.
- On May 29th, The online magazine *The Verge* published a lengthy article by Sam Dean entitled *Konstrui Pli Bonan Lingvon (To Build a Better Language)* [<http://goo.gl/10U0SA>]. It includes interviews with members Neil Blonstein and Ruth Keves-Cohen.
- On June 13th, Minnesota Public Radio's KJZZ FM aired a short report entitled *Esperanto language making a comeback* by Stina Sieg, which was subsequently picked up by National Public Radio (NPR). Both the audio stream and a spirited listener discussion [<http://goo.gl/jhrPr6>] can be found on the NPR website.
- On June 10th, guests Humphrey Tonkin, Erin Piatetski, and Chuck Smith were featured in an in-depth interview on Connecticut Public Radio's WNPR. The 48+ minute program, titled *Esperanto In The Internet Age* [<http://goo.gl/9nFcu5>], is available on WNPR's website.



Traduku usonan klasikaĵon por Liro-2015

La redakcio de la gazeto *La Ondo de Esperanto* denove invitas vin al nia tradicia literatura konkurso *Liro*. Por la anglalingva fako de la konkurso ni proponas la novelon *Lost on dress Parade* de O. HENRY [<http://esperanto-ondo.ru/Novaj/Liro-15e.htm>].



Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina GORECKA (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). Oni povas sendi la tekstojn rete (slipoj estu sendataj en apartaj mesaĝoj), al la adreso <sezonoj@yahoo.com>.

La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1-a de Decembro 2015.

Laŭreato ricevos diplomon kaj libropremion. La organizantoj ĝis la 1-a de Januaro 2018 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la premiita konkursaĵo en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike. Ĝi aperos ankaŭ en antologio de anglalingva literaturo, eldonota de *Sezonoj*. La kopirajto tamen restos ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizantoj por libroforma eldono.

Bonŝancon!

— Halina GORECKA, sekretario de Liro

Ĝojplena kongreso en Detrojto

Raymond BRISEBOIS

Jen priskribo de la Landa Kongreso en Detrojto, en formo de dank-letero, kiun afable sendis nia norda najbaro Raymond BRISEBOIS. Li verkis la tekston je Kanada Tago, la 1-a de Julio.

Festante hodiaŭ Kanado-Tagon kaj baldaŭ Sendependeco-Tagon, mi deziras esprimi al Ŝeri ŬELZ, la Loka Kongresa Komitato (LKK) kaj ŝiaj helpantoj, kaj la E-USA-anoj korajn dankegojn pro la sukcesa Kongreso okazinta pasint-semajfine en Detrojto.



Grupfoto de la Landa Kongreso en Detrojto.

Vere plaĉis al mi renkonti esperantistojn el pluraj

regionoj de kaj Usono kaj Kanado, kaj plue feliĉe konsci la decidon de E-USA denove subteni la daŭrajn klopodojn de la kampanjo de LKK en Montrealo kandidatiĝi por gastigi la Universalan Kongreson de UEA en tiu urbo en 2019 (kune kun E-USA kaj la Esperanto-Societo Kebekia).

La etoso de la detrojta kongresejo kaj aliaj kunvenoj, inkluzive la bonegan universitatan dormejon, kondukis al ĝojplenaj eventoj en tiu histori-plena kaj signifa usona urbo bonvenema. La vidindaĵoj turismaj kaj vizitendaj tiom multas, ke mi sentas la bezonon iam reiri tien por ĝui pliajn aspektojn de tiu regiono (inkluzive delongan volon "pilgrimi" al la fama kasteldomo de aŭtoro James Oliver CURWOOD ĉe la urbo Owosso).

Inter la pluraj fascinaj kongreseroj, kiujn mi ĉeestis, mi aparte ŝatis la dimanĉ-matenan eventon inspiran ĉe la Unitaria Universalisma Preĝejo (alparoladon de D-ro Ronald GLOSSOP titolitan *Mondo sen milito* kaj la belan kantadon de Chris NELSON samevente).

Cetere instruan kaj sangvinan novaĵojn al ni komunikis E-USA-a Prezidanto Orlando RAOLA pri la feliĉa kaj longe atendata restarigo de rilatoj diplomataj inter Kubo kaj Usono, kaj pri la ekaranĝoj de aer-karavano por ke esperantistoj usonaj povu partopreni la Kuban Kongreson de Esperanto en Novembro 2015!

NASK: sidu, parolu, kaj ĝuu!

Mara ROCKLIFF & Cassidy WALKER

Kiam mi kaj mia 12-jara filino revenis hejmen de NASK-2015, mi eliris por vespermanĝi kun miaj amikinoj. Unu el ili demandis, “Kion vi faris en Norda Karolino?”

Mi: “Ni ĉeestis Esperanto-kurson...”

Amikino: “Jes, jes, mi scias... sed vi ne nur sidis kaj parolis Esperanton dum la tuta tempo, ĉu? Ĉu vi ne iris ien? Vidis ion?”

Mi: “Nu, ni iris al muzeoj kaj strat-festivalo kaj artfajraĵoj kaj lemur-rifuĝejo, kaj ni ĝuegis ĉion... sed... vi tute ne komprenas. Sidi kaj paroli Esperanton estis la plej amuza afero!”



Mara kaj Cassidy.

Antaŭ ol ni alvenis al NASK, ni ne sciis, ĉu ni tiom ĝuus paroli. Fakte, ni eĉ ne certis, ĉu ni povus paroli Esperanton. Ni studis la lingvon dum nur ses monatoj, kaj ni studis hejme, rete. Ni neniam parolis la lingvon kun veraj vivaj homoj.

Du aŭ tri fojojn ni ja provis skajpumi kun afablega brazilano Nazaré, kaj ni pli-malpli komprenis unu la alian. Ni sciis, tamen, ke ŝi estas sperta instruisto de lingvoj. Ŝi parolis klare kaj malrapide, kaj ŝi ofte povis diveni, kion ni volis diri. Sed ĉu ni povus kompreni normalajn homojn? Kaj ĉu ili komprenus nin?

Cetere mi havis alian maltrankvilon. Ni sciis, ke ĉeestos lernantoj el multaj landoj: parolantoj de la franca, la hispana, la portugala, ktp. Sed multaj parolas la anglan. Ĉu ni sentos nin ridindaj, parolante nian malfluan Esperanton kun aliaj parolantoj de la angla, en Usono?

Mi ne devis maltrankviliĝi. Ekde la momento kiam ni alvenis al NASK, ni troviĝis ne en Usono, sed en Esperantujo. Kaj ni rapide sentis nin komfortaj, ĉar ĉiuj aliaj parolis nur Esperanton. (Fakte, dum la ok tagoj de la kursaro, nur unu persono ofte insistis “krokodili” al ni: la altnivela instruisto Paŭlo. Eltrovinte, ke plaĉas al ni Gilbert & Sullivan, ĉiufoje kiam Paŭlo vidis nin, li tuj ekkantis – kompreneble, en la angla. Mia filino Cassidy estis tre imponita de lia rapida, lerta recitado de la kanto *I Am the Very Model of a Modern Major General.*)



Kun instruistoj Liĉjo MILLER kaj Paŭlo GUBBINS ofte troviĝas pluŝbestoj. (Foto de Cassidy WALKER.)

Kiam ni babilis kun Nazaré, ni ridis, ĉar ŝi ofte uzis la vorton “fama”. Ŝajne ĉiuj ŝiaj esperantistaj amikoj kaj konatoj estas “famaj” laŭ ŝi — eĉ ni! Sed ĵus malpakinte la valizojn, kiam ni iris al vespermanĝo, ni neatendite renkontis iun “faman” al ni: la unuan esperantiston kiu helpis nin rete, ĉe lernu.net, Margo. Poste ni eltrovis, ke Margo ja sufiĉe famas kiel unu el la plej gravaj kreintoj de la esperantlingva retejo DuoLingo. Sed por ni sufiĉis, ke ni trovis nian “unuan amikon” en Esperantujo.

Ni manĝis kune kaj babilis, kaj Margo diris, ke nia scio de Esperanto pliboniĝis dum la pasintaj ses monatoj. Ŝi eĉ konsilis, ke eble ni povus sukcesi en la meznivela klaso anstataŭ la postbaza.

Mi rigardis mian filinon nerveze. La postbaza instruisto estis la fama (kompreneble) Ĵenja, kiu rolis kiel “Helena” en *Pasporto al la Tuta Mondo*. Ni ambaŭ antaŭĝuis studi kun “Helena”. Krom tio, ni apenaŭ parolis Esperanton; ni vere ne taksis nian nivelon “meza”! Sed gravis al ni lerni laŭeble dum nia mallonga tempo ĉe NASK.

“Demandu al la instruisto”, Margo diris.

Do vespere, dum la unua festo por interparoli, ni alproksimiĝis al Ĵenja. Ni interparolis iomete, kaj mi klarigis, ke Cassidy kaj mi komencis lerni samtempe, studis kune, kaj parolas samnivele. Intertempe, Cassidy restis tute silenta. Finfine Ĵenja konsilis al mi provi la meznivelan klason. Tiam ŝi turnis sin al mia filino:



Ĵenja BONDELID ludas ukulelon dum teatraĵo. De maldekstre: Donner LOHNES, Steĉjo LIN, Murray H. MERNER, Stephen LANG, Taŝa KOZIEJ. (Foto de Cassidy WALKER.)

“Pri vi, tamen, mi vere ne povas juĝi la nivelon, ĉar vi ne estas parolinta”, ŝi diris agreeble.

Mallaŭte Cassidy respondis, “Mi bedaŭras.”

La vizaĝo de la instruisto lumiĝis per rideto. “Ho! Vi ja komprenas min!”

Efektive ni ege feliĉis en la meznivela klaso. La plejparto de la lernantoj estis pli spertaj kaj pli fluaj

ol ni, sed ĉiuj akceptis nin sen plendo. Kaj la instruado estis tute mirinda. Liĉjo kaj lia kuninstruisto Tim instruis per rakontoj, kantoj, ŝercoj, videoj, amuzegaj aktivecoj, kaj eĉ per pluŝbestoj. (Nu, mi *supozis* ke la pluŝbestoj estas por instrui...) Kaj la instruistoj kaj niaj samklasanoj estis tre amuzaj. Vere, mi ne memoras, kiam mi tiom ridis!

Mi aparte ŝatis, ke la klarigoj ĉiam estis nur en Esperanto. Kiam ni ne komprenis ion, la instruistoj klarigis per vortoj kaj agoj, sed preskaŭ neniam per tradukado. Tial mi komprenis en Esperanto kaj ofte eĉ ne pensis per vortoj en mia denaska lingvo.

Ekster la kursoj ni havis multajn ŝancojn por plibonigi nian Esperanton, per amuzaj ludoj (dankon, Hoss!), interesege prelegoj, kaj, kompreneble, “nur sidi kaj paroli”. Ĉe la manĝejo, la pli fluaj esperantistoj volonte nin permesis partopreni iliajn konversaciojn, kaj ni lernis dum ni faris novajn amikojn.



Eddy ANDERSON dancas kun Maria MURPHY, dum Arono ALBRECHT violonludas. (Foto de Cassidy WALKER.)

Eble studado dum ferio ne ŝajnas tre amuza al ĉiuj, sed efektive tio estis la perfekta eskapo por ni. Por mi, la kurso okupis mian cerbon, do mi ne povis pensi pri mia laboro kaj aliaj ĉiutagaj aferoj. Por mia filino, mi pensas ke ŝi ege profitis el la sperto de studado kun malsamaĝaj homoj kaj vidi kiel malsama povas esti “lernejo” kiam kaj instruistoj kaj lernantoj volonte elektas ĉeesti. Kaj por ni ambaŭ, ni kreskigis kaj nian lertecon kaj nian memfidon pri

Esperanto.

Mi sentas min tre dankema al la ĉefa organizanto Ellen, al la instruistoj kaj aliaj helpantoj, kaj ankaŭ al Cathy SCHULZE, kies malavara heredaĵo ebligas al lernantoj kiel ni malmultekoste ĉeesti ĉi tiun mirindan kursaron. Se vi havos ŝancon ĉeesti NASK-on, ne maltrafu ĝin!



La junula vidpunkto

de Cassidy WALKER

Saluton! Ĉu vi volas iri al NASK venontan someron? Mi ĵus iris al NASK. Mi havas dek du jarojn; do mi iris kun mia patrino. Ni aliĝis por la post-baza kurso, sed ni iris al la mez-nivela ĉar la post-baza instruisto pensis, ke ni estas pretaj por la mez-nivela.

Mia patrino pensas, ke la mez-nivela estis perfekta por ni. Por mi, ne estis facile, sed estis defie.

NASK estas malsama ol mia lernejo ĉar:

- La instruistoj ne estas ĝenaj.
- Oni povas sidi kun sia instruisto ĉe tagmanĝo.
- Oni loĝas proksime al la lernejo.
- Oni studas dum nur duono de la tago.
- La instruistoj ne taksas sin pli bonaj ol la lernantoj!



Taŝa KOZIEJ parolas kun Zergie HYNSON dum la interkona vespero. (Foto de Cassidy WALKER.)

Mi kaj mia patrino prezentis raporton al la klaso. Mi tre ĝuis tion. Kaj poste mi rakontis al la klaso pri Arakna, Atena, araneo, ktp.

Estas iomete strange iri al lernejo en somero, sed la kurso daŭras nur ok tagojn! Mi ŝatis NASK-on, kvankam ĝi estis iomete defia.

Kiam mi alvenis ĉe NASK, la plejparto de la lernantoj estis plenkreskuloj. Mi dezirus, se mi irus denove, ke ĉeestu pli multaj infanoj.

Mi volas iri denove al NASK se mi povos.

Mara ROCKLIFF

Mara ROCKLIFF kaj Cassidy WALKER estas "famaj" novaj esperantistoj el orienta Pensilvanio.

Ellie kaj la fantomo

Johano BENTLEY

Ĉu vi kredas je fantomoj? Laŭ mi, ili ne ekzistas. Aŭ tion mi antaŭe kredis, sed nun mi ne estas tute certa.

Mi havis onklinon, Jeannie. Mi diras ‘havis’, ĉar ŝi mortis antaŭ tri jaroj. Jeannie ĉiam estis sana, do ŝia morto estis neatendita. Ŝi vivis sola kun sia hundo Ellie. Tial post ŝia morto pasis du tagoj, ĝis finfine najbaro rimarkis ion misan.

Jeannie kaj ŝia hundo Ellie estis ĉiam kune. Eĉ kiam Jeannie vojaĝis, ŝi neniam irus ien, krom se Ellie povus esti kun ŝi en la ĉambro. Ellie estis pudelo – sed ne unu el tiaj hundetoj, kiujn oni povas porti enmane. Ne, ŝi estis granda pudelo, tute nigra. Tiam specon de hundo oni bredis por ĉasi kaj gardi. Pudeloj tiaj estas tre altaj kaj fortaj. Ili estas ankaŭ tre inteligentaj kaj ege fidindaj, kaj povas esti tre ferocaj.



Johano kaj Ellie.

Tiun lastan trajton eltrovis policianoj du tagojn post la morto de Jeannie. Ili eniris ŝian domon kaj trovis ŝian korpon en la litoĉambro. Sur la lito, apud la korpo, kuŝis ankaŭ Ellie. Ekde kiam Ellie estis nur eta hundido, ŝi neniam volonte lasis la flankon de Jeannie. Certe Ellie ne planis lasi sian homon tiam, kiam Jeannie estis ŝajne ‘malsana’. La policianoj multfoje provis alproksimiĝi, sed ĉiufoje Ellie ekstaris kaj sovaĝe minacis ilin, poste rekuŝante kun sia mentono sur la manon de Jeannie. Finfine la policianoj decidis pafi la hundon. Sed feliĉe la najbaro memoris, ke fojfoje li veturigis la hundon kun Jeannie al mia bestkuracista oficejo. Do li telefonis al mi, kaj mi alvenis.

Ellie estis evidente soifega kaj tre malforta. Ŝi eĉ ne povis stari sen tremi. Ŝi tuj rekonis min, kaj tial ŝi ne minacis min dum mi malrapide alproksimiĝis. Kompreneble mi ne volis alproksimiĝi al du-tag-aĝa kadavro, sed Ellie ne volis forlasi ĝin. Danke al Dio, ĉio krom la mano estis tute kovrita per litotuko. Kaj feliĉe mankas al mi flarpovo – mi neniam estis tiel dankema pro tio, kiel mi estis tiam. Mi provis tiri la hundon for per ŝia kolumo, sed ŝi nur retotiris kaj ŝovis la kadavron per sia nazo. Tiel ŝi kutime provis vekti sian homon. Mi diris kviete al la hundo, “Jeannie estas for, Ellie. Vi devas veni kun mi, nun. Venu, venu.” Ellie provis vekti la kadavron denove. Poste ŝi rigardis mian vizaĝon tre intense, kaj grimpis pene desur la lito.

Ellie estis tiel malforta, ke ŝi preskaŭ kolapsis. Mi devis porti ŝin al mia aŭto. Hundo ne tiom malfortiĝus post nur du tagoj sen akvo, do verŝajne Ellie sidis apud Jeannie de du tagoj antaŭ ŝia morto ĝis du tagoj post ŝia morto. Mi ne volis imagi, kiomfoje ŝi provis vekti Jeannie malsukcese.

Post restado de du semajnoj en mia kliniko, Ellie tute resaniĝis. Sed ŝi ne estis tiel gaja kaj afabla kiel antaŭe. Ŝi estis dolĉa hundo, ĉiam dezirante dorlotadon. Sed ĉefe ŝi nur kuŝis en sia kaĝo. Mi zorgis pri ŝi kaj ekzamenis ŝin multfoje, kaj eĉ sendis sangotestojn al laboratorio por determini, kio ĝenis ŝin. Laŭ ĉiuj testoj, tamen, ŝi estis sana.

Post eble kvin monatoj ŝi ŝajnis denove gaja. Dum unu tuta semajno ŝi denove bojis gaje kiam oni eniris la ĉambron, kaj ŝi lekis mian vizaĝon kaj volis ludi kun mi. Je la fino de tiu semajno ŝi bojis preskaŭ senĉese al muro ekster sia kaĝo. Ŝi dancis, saltis, bojis, kaj prenis sian kondukŝnuron en la buŝo. Tio estis kutima signalo, ke ŝi volis promeni ekstere. Strange, tamen, ŝi montris la signalon ne al mi, sed al la muro. Eĉ tiun vesperon, kiam mi forlasis la oficejon, mi povis ankoraŭ aŭdi ŝin bojanta en la kaĝo.

Matene, mia helpanto telefonis la novaĵon al mi: Ellie mortis dum la nokto. Kiam la helpanto trovis ŝin, ŝi ankoraŭ havis sian kondukŝnuron en la buŝo.

Mi neniam sukcesis malkaŝi kialon de ŝia morto. Eble ŝi havis kaŝitan malsanon, kion mi ne estis

sufiĉe lerta por diagnozi. Sed mi preferas supozi, ke dum tiu lasta semajno Ellie havis vizitanton tre amatan. Mi preferas supozi, ke Jeannie revenis en tiu lasta nokto por havi la lastan promenon kun Ellie kune — tien, kie ŝi vivas nun.



Johano BENTLEY

Johano loĝas en Mobile, Alabama. Kiel profesia bestkuracisto, Johano trovas sin inter sovaĝejo kaj civilizacio, inter bestoj kaj ties homoj. Foje la homoj estas pli sovaĝaj ol la bestoj – aparte kiam

mono postuliĝas.

<johano.warden1@gmail.com>

leterkesto

Feliĉe mi ne timis iri al Detrojto

Kiam usonano diris al mi, ke Detrojto estas danĝera urbo, mi unue hezitis aliĝi al la komuna kongreso de Esperanto-USA kaj la Kanada Esperanto Asocio. Mi ankaŭ cerbumis, ĉu mi aŭdacus veturi tien per propra aŭtomobilo, aŭ ĉu estus pli sekure uzi publikan transporton. Ĉiuokaze mi finfine decidis veturi per propra aŭtomobilo kaj spertis neniun problemon.

La tereno de la universitato Wayne impresas kiel publika parko. La arabinspirita arkitekturo de ĝiaj relative novaj konstruaĵoj provizas interesajn vidindaĵojn. Pro ekonomia malkresko, multajn konstruaĵojn en Detrojto oni malkonstruis, sed en tiuj lokoj oni faris publikajn ĝardenojn tiel ke la

ĝenerala etoso estas inspira, ĝoja kaj optimisma.

Mi estas feliĉa, ke mi ne lasis min fortimiĝi de tiu ĝoja kongreso, kaj ke sep kanadanoj ĉeestis.

— *Detlef KARTHAUS, Toronto*

Skribu al Usona Esperantisto!

Bonvenaj estas viaj komentoj (en la angla aŭ en Esperanto) ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la lingvoproblemo, aŭ ĉu pri io lastatempe aperinta en *UE*. Leteroj estu prefere ne pli ol 300 vortojn longaj; anoncoj, ne pli ol 400. Sendu mesaĝojn al la redakcio.



Duolingo: a turning point for Esperanto?

Xavier ALCALDE

Duolingo is one of the most popular online tools for learning languages, with more than 100 million users. If current trends continue, it will eventually be the most popular. And now, it can also be used for learning Esperanto [<https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online>].



duolingo

Why is it so popular? First, unlike other systems such as Rosetta Stone, it is completely free. Second, it is effective. According to a study by researchers at the City University of New York and the University of South Carolina [http://static.duolingo.com/s3/DuolingoReport_Final.pdf], 34 hours of duolingo is equivalent to a semester in a university course. And Duolingo claims to have more users from the United States than there are language students in the country's public school system. But the ambition of its creators (award-winning Guatemalan computer scientist Luis von Ahn and his former student Severin Hacker) goes even further. They dream of translating the World Wide Web into every human

language. In order to do so, they aim to teach all languages through their website.

The Esperanto course. Since the end of May 2015 a beta version of the Esperanto course has been open to everyone. In just the first two weeks, the number of users soared to 25,000, even more than for courses for more traditional languages like Ukrainian. Chuck Smith, team leader of the Esperanto course, calculates that 200,000 people could be learning Esperanto through Duolingo by the end of 2015. The quality and content of the course improves and expands every day, thanks in part to user comments. So far the course is available only for English speakers. Once it has undergone sufficient testing, new Esperanto courses might be added to allow students to learn Esperanto from other languages, such as Spanish or Chinese.

Challenges for the future. Having Esperanto as part of Duolingo could mark a turning point for the Esperanto movement. We can imagine a near future where the number of Esperanto speakers could be higher than ever. And growing. We can even foresee a world in which people could learn other languages more easily by way of Esperanto. If so, Esperanto would no longer be a minority language and we need to be prepared for the exciting challenges ahead.



Xavier ALCALDE

Xavier Alcalde estas politologo kaj esploristo pri paco, kiu loĝas en Barcelono, Hispanujo. Li multe interesiĝas pri lingva justeco kaj estas la sekretario de la Kataluna Esperanto-Asocio.

<alcalde.javier@gmail.com>

senintenca esperantaĵo?

Legenda

Ruth KEVESS-COHEN



Nia kara leganto Ruth ("Margo") KEVESS-COHEN sendis al ni la jenan reklamon, kiun fotis ŝia edzo David en Budapeŝto. Ni scivolas: ĉu budapeŝtaj legendoj estas tiel banalaj, ke ĉefrolas en ili eĉ urbaj krozŝipetoj? Aŭ ĉu la reklamo estas simple leg-enda?

Usona Esperantisto

Sendu kontribuojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn du monatojn post la eldondato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content two months after publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to an address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.